

& Ruzulo:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 222 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per sama melodio kiel por Konfeso kaj simila rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:37> (

/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa So
(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do
mire do dodo Ti La a)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /Viro estis kondamnita ; Al la morto
per la ŝnur'. ; "Ĉar vi estas nepunita", ;
Diris la juĝisto Knur',

(×: **Zorge li morton pripensas ;
Sentas ke la sorto densas ; La
juĝiston ruzas li ; Zorge li morton
pripensas.**)

"2 "La ĝardenon vi inspektu ; Kaj la
arbon mem elektu, ; Sur kiu volas morti
vi, ; Kaj vin sur ĝi pendigos ni."

'3 La krimul' rapide diris: ; "Simpla
estas la afer': ; Rozojn ĉiam mi deziris ;
Dum la vivo sur la ter'.

'4 Inter rozoj do mi mortu, ; Rozoarbo
do min portu! ; Kaj tial mi petegas vin:
; Sur rozarbet' pendigu min!"

'5 "Rozarbeto ne sufiĉas", La juĝist'
informis lin, ; "Ĝi ja teren tuj kurbiĝas ;
Se ĝi devas porti vin."

'6 Diris la krimul' ridante: ; "Sed ĝi
kreskas ja konstante: ; Kaj kiam ĝi ne
fleksos sin, ; Nur tiam vi pendigu min!"
.....)